# JURA TRIBUNO INTERNACIA

§

**N-ro 14**
**Jaro 2015**
**Esperanta Jura Asocio**

Eldonas: ESPERANTA JURA ASOCIO
kun la kunlaboro de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Poŝta Adreso: José María Rodríguez Hernández
JURA TRIBUNO INTERNACIA
Apartado de Correos 3142
E-14080 CÓRDOBA (Hispanio)

Elektronika Adreso: esperanto14@ono.com

Direktoro: José María Rodríguez Hernández

Kunlaboris ĉi-numere: D-ino Rafaela Urueña Álvarez
Prof. Luis Córdova Arellano
André Ruysschaert

La revuon ricevas ĉiuj membroj de EJA. Por aliĝi al nia asocio informoj aperas sur la paĝo 8-a

Depósito Legal: CO-844/97
Edita: Asociación Andaluza de Esperanto
Apartado de Correos 611
14080 Córdoba
Imprime: Litopress SL

# ENHAVO

Paĝo

| | |
|---|---|
| Prezento | 5 |
| Raporto pri la kunsido de EJA dum la Universala Kongreso. Bonaero 2014. | 11 |
| Vivo de la Asocio | 14 |
| Kiam estos speciala kortumo por la medio? | 15 |
| Protektado de la infanaj viktimoj de la homo-komerco | 27 |
| Mallongaj juraj informoj | 33 |

# PREZENTO

§ Verŝajne, kongresi estas la plej karakteriza elmontro de la esperantista kulturo. Ekde la unuaj jaroj de nia movado, esperanto-parolantoj emis renkontiĝi por montri la ceterulojn, ke esperanto estis la plej bona solvo por ebligi la komunikadon inter ĉiuj homoj. Miloj da kongresoj kaj renkontiĝoj okazis ekde tiu unua en Bulonjo-ĉe-maro kaj ĉiuj ili estas same gravaj, ĉar okaze de ili renkontiĝis *homoj kun homoj*, kiel siatempe diris L. Zamenhof. Tamen, estas necese agnoski, ke la Universalaj Kongresoj estas ege specialaj. Hodiaŭ en Lillo (Francio) okazas la 100-a Universala Kongreso de Esperanto kaj en niaj memoroj aperos tiuj homoj kiuj, eble reveme, organizis la Unuan Kongreson en la jaro 1905, inter ili Alfred MICHAUX, kiu ankaŭ prezidis la Societon Internacian de Juristoj Esperantistaj.



Alfred Michaux 1859 - 1937

Tiutempe, oni parolis pri la "lingva problemo", tiu tutmonda situacio kiu malebligas la homajn kontaktojn kaj antaŭ kiu esperanto aperis kiel solvo. Hodiaŭ, kvankam la problema eble daŭre restas, oni preferas mencii la "lingvajn rajtojn", tiu ekzistanta rajto kiu ebligas, ke ĉiu homo parolu sian patrinan lingvon, sen la devigo uzi lingvojn

apartenantajn al aliaj kulturoj. Esperanto ankaŭ prezentiĝas kiel solvo por la efektivigo de tiu rajto, pro la fakto, ke pere de la uzado de neŭtrala lingvo, ne posedata de iu konkreta lando aŭ komunumo, ĉiuj lingvoj, ĉefe la plej minoritataj, ricevas taŭgan protektadon.

Do, la lingvoj ne devas aperi kiel problemoj, sed ja kiel rajtoj apartenantaj al ĉiuj homoj de ĉiuj kulturoj. Kaj jen unu el la plej gravaj celoj de nia asocio, havigi konscion al ĉiuj pri la homaj rajtoj, ankaŭ pri la rajto uzi la propran lingvon sen eksteraj devigoj, ŝanĝemaj pro la tempoj, pro la ekonomio kaj antaŭtempe eĉ pro la militaj fortoj.

Tiel, la ekzisto de asocio en la esperanto-movado, celanta paroli pri rajtoj, pri leĝoj, pri juĝoj estas tute necesa. Esperanta Jura Asocio denove renkontiĝas kadre de Universala Kongreso de Esperanto kaj espereble tio signifos, ke la daŭrigo kaj estonteco de nia asocio estas tute certigita. Kompreneble, kaj kiel oni jam diris jaron post jaro, ekzisto de asocio nur estas ebla dank'al la intereso kaj kunlaboremo de la membroj. Pro tio, ni invitas al ĉiuj membroj de nia asocio kunlabori kun ĉi tiu organizo, ekzemple, pere de la sendo de manuskriptoj pri juraj temoj, kiuj plezure estus eldonitaj de nia asocio por plialtigi la nombron da juraj verkoj en la internacia lingvo. Kaj se oni ne kapablas verki tutan libron, estus ankaŭ bona ideo kunlabori kun la asocio pere de la sendo de artikoloj kaj kunlaboraĵoj al ĉi tiu revuo, kiu estas la oficiala organo de la asocio.

Ni dankas ĉiujn kiuj ebligas la aperon de la revuo kaj konkrete de ĉi tiu numero. Sur ĝi, Vi trovos raporteton de la lasta kunsido de EJA, okazinta pasintjare en Bonaero (Argentino). Poste, Vi trovos altkvalitan artikolon de nia Prezidanto, D-ino

Rafaela URUEÑA, pri la neceso starigi internacian kortumon pri medio. Ja, la internaciaj organizoj komprenis la neceson fondi kortumojn pri diversaj aferoj cele la solvon de la plej gravaj problemoj de la homaro: homaj rajtoj, mara juro, genocido, internaciaj krimoj, ktp, tamen, ŝajnas, ke la organizaĵoj ankoraŭ ne estas konsciaj, ke problemoj rilate la medion povas damaĝi la tutan mondon, kaj ne nur konkretan landon.

La Direktoro de la revuo verkis mallongan artikoleton pri la internaciaj kunvenoj rilataj al la infano-komerco. Se la homo-komerco estas gravega delikto, spite al landlimoj, kiam temas pri infanoj la konsekvencoj estas teruraj. Fine de la revuo, aro da mallongaj juraj informoj de diversaj kontinentoj finigas ĉi tiun 14-an numeron de la revuo.

Nu, al ĉiuj ĉeestantoj en la 100-a Universala Kongreso de Esperanto ni deziras agrablan restadon kaj al la gepartoprenantoj en la kunsido de Esperanta Jura Asocio ni deziras fruktdonan kunvenon. Ĉi-jare la renkontiĝo de nia asocio estas speciala, ĉar nova estraro devas esti nomumita. Nia Prezidantino ĉesos estri la juran asocion. Ni gratulas al ŝi kaj samtempe ni dankas pro ŝia sindediĉo, pro ŝia konstata kunlaboremo kun nia revuo kaj pro ŝia sukceso verki pri juraj temoj ankaŭ en esperanto, la lasta estis libro temanta pri la konstruado de la Eŭropa Unio, paŝon post paŝo. Espereble, D-ino URUEÑA restos kiel fidela kunlaboranto de la asocio kaj ankaŭ de la revuo, por ni estus grandega honoro.

*José María Rodríguez Hernández*
*Direktoro de*
*JURA TRIBUNO INTERNACIA*

# ALIĜU AL ESPERANTA JURA ASOCIO

Ordinara membro devas esti profesia juristo aŭ posedi universitatan aŭ ekvivalentan diplomon pri juro aŭ esti studanto por tia diplomo. Ĉiu alia persono povas peti aliĝon kiel asocia membro. Membriĝo kostas 7 eŭrojn se vi loĝas en iama socialisma lando de Orienta Eŭropo, Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko), Afriko aŭ Latina Ameriko. Kaj 14 eurojn se vi loĝas en alia lando.

Eblas pagi al UEA-konto ejax-r (pri pagmanieroj vidu en la *Jarlibro* de UEA). Se kotizi kaŭzus al vi transpagajn aŭ ekonomiajn malfacilojn, bv. skribi pri tio al la sekretario luisesperanto@yahoo.com aŭ al la elektronika adreso: esperanto14@ono.com

# Kunlaboru kun *JURA TRIBUNO INTERNACIA*

Se Vi emas verki en esperanto pri juraj temoj ni plezure aperigos Viajn kontribuaĵojn en niaj paĝoj. Vi nur devas atenti pri la jenaj kondiĉoj:

ARTIKOLOJ: rilataj al iu jura branĉo. Do: krimpuna, ekonomia, imposta, civila, internacia, historia, filosofia, administracia, ktp. Pri la

longeco, pli malpli 4/10 foliojn A4 (unuflanka duobl-spaca). Se eble aldonu kelklinian resumon pri la artikolo.

RECENZOJ: Vi povas recenzi verkon. La libro elektota devas temi pri Juro, kvankam ne necese pri/en esperanto. La libro povas esti redaktata en kiu ajn lingvo, tamen la recenzon oni devas verki en esperanto.


INFORMOJ: Vi povas informi pere de ĉi tiuj paĝoj pri juĝoj, novaj leĝoj, internaciaj aferoj, traktatoj, ktp, aŭ pri io rilata al la Juro en Via lando aŭ komunumo. La informoj devas ampleksi 1/3 foliojn.

TRAKTATOJ: se Vi tradukis kelkan internacian traktaton, aŭ scias kie aperas la Esperanto-traduko de kelka internacia kunveno, informu al ni pri tio.

Ne dubu kunlabori kun la jura revuo. La proksima numero aperos dum la monato junio 2015, do, prefere se oni ricevas la materialon antaŭ la fino de la monato majo 2015.

La redakciaj adresoj estas:
✉ *Jura Tribuno Internacia*, Apartado de Correos 3142
E-14080 Córdoba (Hispanio)

💻 esperanto14@ono.com



Fakultato pri Juraj, Politikaj kaj Sociaj Sciencoj en Lillo (Francio)

# Raporto pri la kunsido de Esperanta Jura Asocio dum la Universala Kongreso Bonaero 2014

La 29-a de julio 2014 okazis en la argentina ĉefurbo Bonaero la kunsido de Esperanta Jura Asocio, kadre de la tiam okazanta 99-a Universala Kongreso de Esperanto. Unue, la Prezidantino de la Asocio, D-ino Rafaela URUEÑA salutis la gepartoprenantojn. Ŝi sciigis, ke EJA daŭras kiel faka asocio de Universala Esperanto Asocio kaj oferis al la ĉeestantoj la numeron 13-an de la revuo *Jura Tribuno Internacia*, ĵus aperinta.

Same, ŝi prezentis sian libron *"Eŭropa Unio, paŝon post paŝo"*, kiu estas disvendata en la libroservo de la Universala Kongreso en Bonaero. La libro gravas, ĉar la plejparto de la eŭropa loĝantaro ne konas la strukturon de Eŭropa Unio. La verko ne nur temas pri la patroj de Eŭropa Unio, ĝiaj institucioj, fontoj kaj reformoj, sed ankaŭ pri la klimata ŝanĝo, eŭropa civitaneco kaj financa krizo. La libro estas eldonita de EJA mem kune kun la kunlaboro de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.



Maldekstre-dekstren: S-ro Ivo OSIBOV, S-ino Rafaela URUEÑA kaj S-ro Luis CORDOVA

La prezidantino informis ke oni planas krei kurson pri Internacia Juro pri la Maro kadre de la Universitato de Esperanto (http://www.universitato.info). Poste D-ino URUEÑA prezentis al Ivo OSIBOV, kiu prelegis pri la maraj limaj konfliktoj inter Kroatio kaj Slovenio. La ĉeestantoj dankis al li pro klereca prelego.



S-ro Ivo OSIBOV okaze de sia prelego

Partoprenis enute 18 gesamideanoj, al tiuj ĉeestantoj kiuj ankoraŭ ne aliĝis al Esperanta Jura Asocio, oni proponis tiean aliĝadon. Fine, la prezidantino informis pri la ebleco prelegi pri jura temo okaze de la venonta kunsido de Esperanta Jura Asocio, kadre de la 100 Universala Kongreso en Lillo (Francio). S-ino Antoneta NIKOLAEVA sin mem proponis prelegi pri Bulgario kaj Eŭropa Unio.

Malfermiĝis tiam la tempo por demandi aŭ proponi al la Estraro. Advokato Luiz RODRIGUES DIAS de Brazilo proponis kurson por la Universitato de Esperanto. La prezidantino denove komentis pri la planata kurso de EJA pri Internacia Juro pri la Maro. Fine oni sciigis, ke dum la venonta kunsido de EJA devas okazi ŝanĝo en la Estraro de la Asocio.





Kelkaj momentoj dum la kunsido de Esperanta Jura Asocio

# Vivo de la Asocio

§ Okaze de la venonta kunsido de Esperanta Jura Asocio, okazonta kadre de la 100-a Universala Kongreso de Esperanto, oni devos elekti novan Estraron. Laŭ la statuto de nia asocio (art. 8-a), *la estraro oficas ĝis la fino de la tria jarkunveno post la elekto.* Do, ĉi tiu nova elektota estraro oficos ĝis la Universala Kongreso de la jaro 2018.

Laŭ la artikolo 7-a *la estraro konsistas el prezidanto, la sekretario kaj tri simplaj estraranoj.*

§ Laŭ decido de la pasinta kunsido de nia asocio, EJA partoprenos en la Universitato de Esperanto pere de la realigado de kurso pri Mar-juro. La kursoj en ĉi tiu universitato baziĝas sur interreta materialo produktita de la organizanto de la kurso. La respondeculo de la enhavo de la kurso estas José María Rodríguez, kiu ellaboras nun la tekston de la kurso. Fine de la kuranta jaro 2015 li finpretos la tekstojn de la lecionoj kiu estos prezentataj al la estraro de la asocio kaj ĉefe al D-ino Rafaela Urueña, universitata profesorino pri internacia juro kaj fakulo pri mar-juro. Se la teksto estas aprobata, aŭ post la necesaj ŝanĝoj, oni preparos la intrretan materialon kiun ni havigos al Universitato de Esperanto dum la somero 2016.

Nuntempe estas alireblaj en ĉi tiu Universitato, kursoj pri "Milito kaj Paco", "Enkonduko al Astronomio" kaj "Filozofio de la Informadiko". Vizitu: www.universitato.info

# KIAM ESTOS SPECIALA KORTUMO POR LA MEDIO ?

✍ D-ino María Rafaela Urueña Álvarez
Hispanio

La protektado de la medio estas vera tutmonda afero. Ekde la naskiĝo de la ŝtatoj laŭ la moderna internacia juro, estas la suvereneco kaj aŭtonomeco de la ŝtatoj kiuj ĉion regas. Pro tio, ili decidas kiel uzi kaj gardi la naturajn rimedojn kiuj kuŝas ene de siaj landlimoj.

Oni konstatas, ke samtempe plimultiĝas la loĝantaro kaj malkreskas la bazaj naturaj rimedoj pro troa ekspluatado. Antaŭ tiu fakto, ni konstatas, ke pro tiuj gravaj mediaj minacoj, endanĝeriĝas la tutmonda sekureco. La ŝtatoj, kiel respondeculoj pri la gardado de la medio, devas garantii la aliron al naturaj rimedoj pli kaj pli limigitaj, kaj samtempe gardi la sekurecon per duflankaj aŭ multflankaj traktatoj.

Certe estas kelkaj naturaj rimedoj esencaj aŭ strategiaj por la postvivado kaj evoluo, kiel estas akvo kaj petrolo, kiuj kutime kaŭzas internaciajn konfliktojn. Do, estas kreskanta ligo inter ŝtatoj, sekureco kaj medio.

La nomata *"ekologia sekureco"* ne estas facile atingebla kaj estonte la konfliktoj kaŭzotaj pro manko aŭ malabundo de esencaj rimedoj estos pli oftaj, ĉefe en evoluantaj landoj, sed ne nur en ili. Tiuj konfliktoj havas kaj havos en sia origino la nesalajn akvojn, la arbarojn, la fiŝkaptadon kaj la kultivitan teron.

Estante la tutmonda sekureco en danĝero, devas esti la internacia socio kaj ne nur la ŝtatoj, kiuj devas adopti novajn sistemojn por solvi la aferon kaj konsideri la gravecon de la kunlaboro kiam malabundas naturaj rimedoj, per ilia bona distribuo cele al daŭripova evoluo.

Laŭ la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj, artikolo 33, la paca solvo de disputoj devas fariĝi *"per traktato, enketo, mediacio, konciliacio, arbitracio, juĝa decido, sinturno al regionaj institucioj aŭ interkonsentoj, aŭ per aliaj pacaj metodoj kiujn ili elektas mem. La Sekureca Konsilio, se ĝi opinias tion necesa, elvokas la partiojn solvi sian disputon per tiaj metodoj"*.

Estas la Sekureca Konsilio kiu havas la ĉefan respondecon gardi la pacon, kaj kiu devas fari rekomendojn al la partioj por la paca solvo de la disputoj. Kiel asertas la artikolo 36 de la Ĉarto, ordinare juraj disputoj devas esti prezentataj de la partioj ĉe la Internacia Kortumo, konforme al la preskriboj de la Statuto de la Kortumo.

Sciate estas ke, kune kun la Internacia Kortumo de Unuiĝintaj Nacioj, funkcias multaj aliaj kortumoj kaj tribunaloj, ĉu universalaj, ĉu regionaj, ofte specialaj por difinitaj celoj.

Inter tiuj jurisdikciaj institucioj, elstaras, ene de la Unuiĝintaj Nacioj (UN) la menciita *Internacia Kortumo*, vera organo de UN kies statuto enkadriĝas en ties Ĉarto de 1945, kun ĝenerala juĝrajto por ĉiu disputado inter ŝtatoj, ĉu jurkonflikta ĉu konsultiĝa.

Ene de la sistemo de UN funkcias ankaŭ la *Internacia Marjura Kortumo*, starigita per la Konvencio de UN pri Juro de la Maro de 1982, speciala por marjuraj temoj. Ĝi konsistas el 21

juĝistoj kaj la sidejo estas en Hamburgo (Germanio). Tiu ĉi kortumo ricevis unuafoje plendon la 13-an de novembro 1997, post la prezento de konflikto pri la ŝipo "Saiga". Laŭ la Konvencio pri Juro de la Maro la ŝtatoj povas elekti, en la momento de la subskribo aŭ ratifo, plurajn solvojn por iliaj disputoj, nome, iri antaŭ la Internacia Marjura Kortumo, antaŭ la Internacia Kortumo, aŭ antaŭ arbitracia tribunalo. Tamen ĝis nun, la plendoj prezentitaj temas ĉefe pri aferoj rilatantaj al la jurisdikcio de la ŝtatoj laŭ la diversaj marzonoj, aplikado de doganaj leĝoj, fiŝkaptado kaj respondeco de la ŝtatoj pro neplenumo de tiu parto de la Konvencio, sed ne pri marmediaj problemoj.

Inter la *regionaj kortumoj* elstaras la *Eŭropa Kortumo pri Homaj Rajtoj*, naskiĝinta en 1950 ene de la Konsilio de Eŭropo, kun sidejo en Strasburgo (Francio) por interpreti kaj apliki la Eŭropan Konvencion de Homaj Rajtoj; la *Kortumo de Eŭropa Unio*, starigita en 1957 inter la originaj institucioj de la tiama Eŭropa Komunumo, por juĝi ĉiujn aferon rilataj al la komunuma sfero kaj interpreti la komunuman leĝaron; la *Interamerika Kortumo de Homaj Rajtoj*, kreita de la Amerika Konvencio de Homaj Rajtoj de 1969, aŭ la Pakto de Sankta Jozefo, validigita en la jaro 1978, aplikebla nur al membroŝtatoj kaj al la Interamerika Komisiono de Homaj Rajtoj; la *Anda Kortumo de Justico* kreita en 1979 kiel organo de la Anda Komunumo kaj la *Afrika Kortumo de Homaj Rajtoj*, ekfunkcianta en 2006, ene de la Afrika Unio.

Kune kun tiuj kortumoj, ni trovas *specialajn tribunalojn* por juĝi estintajn kaj nunajn punjurajn konfliktojn, rilataj ne al ŝtatoj sed al individuoj pro aktivaĵoj, ege gravaj, kontraŭ la

Homaro: (specialaj tribunaloj de Nurembergo, de Tokio, pri eksa Jugoslavio, ktp.) En tiu senco, funkcias konstanta kortumo, nome, la *Internacia Punjura Kortumo*, kies statuto estis subskribita en Romo (Italio) en 1998, valida ekde 2002, kiu signifis la starigon de konstanta kortumo por punjura internacia persekuto de homoj kiuj plej grave atakis per agadoj kaj masakroj, kaŭzante militkrimojn, genocidon kaj krimojn kontraŭ la homaro.

Sed ni revenu al mediaj problemoj. Kiam oni analizas la solvon de internaciaj malkonsentoj en la media sfero, ni konstatas, ke temas pri la Internacia Kortumo kiu ludas ĉefan rolon, kaj kvankam ĝis nun la nombroj de aferoj pri kiuj tiu kortumo verdiktis estis malgranda, tiu nombro plialtiĝas kaj atendas solvon. Oni atendas de ĉi tiu kortumo unuflanke, la interpretadon kaj evoluon de la bazaj principoj de la Internacia Juro de la Medio, nun grava branĉo de la Internacia Juro, sed aliflanke, la praktiko jam montras, ke la ecoj de la mediaj malkonsentoj malfaciligas la serĉojn de juraj solvoj per tiu internacia kortumo. Pro tio, nune la internacia doktrino dubas ĉu daŭriĝi per tiu vojo, ĉu pledi, kiel jam petis multaj gravuloj rilate la median juron, favore al speciala faka kortumo.

La mediaj temoj prezentas grandan teknikan kompleksecon, pro tio, cele kompreni la problemojn kiujn havis kaj havas la Internacia Kortumo, ni konstatos du periodojn kies ĉefa dato estis 1993. Antaŭ ol tiu jaro, la mediaj aferoj prezentitaj ĉe tiu kortumo ne sukcesis atingi verdikton pri la kerno de la problemo, pro juraj kialoj. En tiu senco, elstara afero estis tiu pri la *Kanalo de Korfuo* (Unuiĝinta Regno de Britio kaj Nordirlando kontraŭ Albanio) de la 9-a de aprilo 1949. En tiu afero, kiu enhavas kelkajn klasikajn asertojn pri la principoj de la juro de la medio, grave estas konstati, ke la Kortumo apogas sin

sur la datumoj donitaj de komisiono de spertuloj kreita por tiu celo. Tamen, kvankam estis komisiono de spertuloj, en tiu unua periodo la Kortumo fidis ĉefe je la datumoj kaj informoj senditaj de la partioj. Fakte, estis ofta, ke tiu Kortumo rekomendis al la partioj intertraktadon por fini la malkonsenton, precipe pro la teknikaj malfacilaĵoj kiuj malebligis trovi justan decidon.

Je la komenco de la naŭdekaj jaroj, ĉiuj konstatis, ke la mediaj problemoj estis multe pli oftaj ol antaŭe kaj konsiderante, ke la internacia doktrino pledis pro specialeco pri tiuj aferoj, en la jaro 1993 oni kreis la Specialan Ĉambron pri la Medio. La celo estis alporti al tiu Ĉambro, de la Internacia Kortumo, la aferojn kiuj havus gravan parton de komplekseco en tiuj mediaj kvereloj. Malgraŭ la favoraj antaŭvidoj, baldaŭ oni konstatis, ke tiu Ĉambro ne estis la solvo, ene de la Internacia Kortumo. La interkoneksaj temoj kiujn enhavas la polemikoj inter ŝtatoj, ofte mediaj, ofte juraj, ofte politikaj, malfaciligis la solvon de tiuj aferoj kaj kondukis al la fino de la funkciado de tiu Ĉambro en la jaro 2006, ne plu okazante la jara elekto de la membroj.

Post tio, denove la Internacia Kortumo juĝis kelkajn mediajn aferojn, sed sen granda sukceso. Unu el la plej gravaj aferoj estis tiu pri la *Projekto Gabcikovo-Nagymaros* (Hungario/Slovakio) de la 25-a de septembro 1997, kies konkludo estis kompleksa kaj ambigua, klopodante akordigi la interesojn de ambaŭ partioj, sen sukcesi trovi efikan rezulton. La decido de la Kortumo daŭre prezentas demandojn, pro la fakto, ke la verdikto havis sep malakordajn kaj tri individuajn opiniojn.

La kaŭzo de tiu disputo estis la subskribo la 16-an de septembro 1977 de traktato inter Hungario kaj Ĉeĥoslovakio pri

la konstruado kaj funkciado de kluzoj en *Gabcikovo-Nagymaros*, ĉe la rivero Danubo. La kunutiligado havis kiel celon la hidroelektran produktadon, tre necesan por Slovakio, kaj la plibonigon de la navigado, per projekto en la riverbordoj kontraŭ la inundoj. La laboroj komenciĝis en la jaro 1978, sed post gravaj kritikoj la hungara registaro decidis en majo 1989 ĉesigi la laborojn en *Nagymaros*, atendante pliajn teknikajn studojn. En 1991 Ĉeĥoslovakio decidis daŭrigi la projekton provizore kaj la hungara registaro informis Ĉeĥoslovakion pri la deziro finigi la traktaton de 1977. En la jaro 1993, kiam Slovakio estis jam sendependa ŝtato, ambaŭ subskribis en Bruselo kompromison por prezenti la aferon antaŭ la Internacia Kortumo, agnoskante la traktaton de 1977 kaj alian pri komuna helpo samjara, kiel validajn.

Hungario pledis pro la forlaso de la laboroj pro ekologiaj kialoj, pro damaĝoj al flaŭro kaj faŭno, dum Slovakio akuzis Hungarion pro rompo de la traktato de 1977.

La Kortumo studis la artikolojn de la Konvencio de Vieno de la jaro 1969 pri fino aŭ ĉesigo de traktatoj kaj la respondecon de la ŝtatoj, konsiderante ĉu vere ekzistis *"grava kaj tuja danĝero"* por la medio. Fine, la Kortumo konkludis, ke Hungario ne devis forlasi la laborojn en 1989, sed ankaŭ Slovakio ne devis rekomenci tiujn laborojn kiel provizoran solvon, do, ili ambaŭ agis kontraŭleĝe.

Aliflanke, Hungario argumentis "bazan ŝanĝon de cirkonstancoj", ĉar ĝi neniam akceptis Slovakion kiel sukcedanton en la traktato de 1977, post la divido de Ĉeĥoslovakio. La Kortumo ne konsideris tiun postulon, ĉar tiu ŝanĝo de cirkonstancoj ne estis bazo de la interkonsento en la menciita traktato, nek ĝi modifis esence la plenumontajn devojn.

Kontraŭe, la Konvencio de Vieno pri traktatoj antaŭvidas la aŭtomatan sukcedon en la traktatoj pro la "principo je kontinueco". La Kortumo petis de ambaŭ partioj la kunlaboradon kaj la respondecon, sen fiksi sumon pro la damaĝoj.

La decido de la Kortumo daŭre prezentas demandojn pro la fakto, ke la verdikto havis sep malakordajn opiniojn kaj tri individuajn, kiuj reliefigis la koncepton pri daŭripova evoluo kaj aliajn principojn de la media juro. Gravas ke tiu verdikto denove rememorigas esencajn principojn de la juro de la medio, kiel tiuj de la justeco, proporcieco, bona fido, ktp.

Tiuj juĝaj problemoj por atingi justecon denove aperis en la *Afero pri starigo de fabrikoj de celulozo en la rivero Urugvajo*, inter Argentino kaj Urugvajo, finanta per verdikto de la 20-a de aprilo 2010, kiu ankaŭ ne atingis konsenton ĉar ĉi-foje estis sep malakordaj opinioj.

Tiu ĉi problema enkadriĝas ene de la strategio pri plantado de eŭkaliptoj, cele al la produktado de celulozo, iniciatita kaj stimulita en Sudameriko kun la helpo de la Monda Banko kaj la Interamerika Banko por Evoluo, dum la 80-a kaj 90-a jaroj de la pasinta jarcento. Inter la landoj kie tio okazis troviĝas Argentino, Brazilo, Ĉilio kaj Urugvajo.

Du entreprenoj pri celulozo, unu hispana kaj la alia finna, instalis sur urugvaja teritorio, en urbo *Fray Bentos*, lime al argentina urbo *Gualeguaychi*, du fabrikojn de celuloza pasto, sur internacia rivera kursado. La rivero Urugvajo estas, plejparte, landlimo inter Argentino kaj Urugvajo, do, "landlima areo", kiu postulas kundividitan kaj integran traktadon kiu, laŭ la internacia juro, garantios la daŭripovan utiligon de la rivero, ene de bona

najbareco kaj kunlaboro, centra, regiona kaj loka. Krom tio, la agadoj en tiu rivero estis submetitaj al Statuto de la Rivero Urugvajo de la 26-a de januaro 1975.

Argentino prezentis plendon ĉe la Internacia Kortumo por reklamacii kontraŭ la menciitaj fabrikoj de celoluzo. Siaflanke, Urugvajo reklamaciis antaŭ la arbitracia sistemo de MERCOSUR (Suda Komerca Merkato), pro la argentina malobservo de libera circulado tra la rivero Urugvajo, sed poste ĝi prezentis plendon antaŭ la Internacia Kortumo, pro konstata popola blokado de la vojoj de tri el la kvar internacia pontoj inter ambaŭ landoj, kun evidente pasiveco de la argentina registaro. La statuto de la rivero Urugvajo certigas la devojn de la informado kaj antaŭkonsulto fare de la riverborda ŝtato kiu proponas komenci laborojn aŭ utiligadon de tiu ĉi internacia rivero, kiam oni kaŭzos modifojn aŭ gravajn damaĝojn al alia riverbordano. Ankaŭ tiu statuto starigas la devon protekti la akvan medion kontraŭ poluado, kaj la internacian respondecon de la ŝtatoj. Krom tio, gravas alia jura teksto, nome la "Konvencio pri la rajto je la uzo de internaciaj kursadoj de akvoj por celoj aliaj ol la navigado", de la jaro 1997, kiu reagnoskas la devojn informi kaj konsulti. Tiu konvencio estis aprobita per Rezolucio 51/299, de la Ĝenerala Asembleo, valida la 17-an de aŭgusto 2014, post la ratifo de Vjetnamio (35-a ŝtato ratifanta).

Antaŭ la neebleco atingi interkonsento de ambaŭ ŝtatoj, Argentino prezentis la 4-an de majo 2006 plendon kontraŭ Urugvajo ĉe la Internacia Kortumo kaj petis provizorajn rimedojn. La 13-an de julio 2006 la Kortumo rifuzis la provizorajn rimedojn kaj urĝis al ambaŭ ŝtatoj plenumi la internacian juron kaj substrekis la bezonon konsulti kaj kunlabori laŭ la Statuto de 1975 ĝis kiam la Kortumo decidos. La verdikto

de la 20-a de aprilo 2010 ne atingis konsenton kaj havis sep malakordajn opiniojn.

Kien ni konstatas, tiu ĉi konflikto estas esence media, kaj la mediaj aspektoj ne estis studataj de la Internacia Kortumo. Eble Argentino kaj Urugvajo devus serĉi la solvon ĉe MERCOSUR, kies "Kadra Interkonsento pri Medio" funkcias kaj starigas la kunlaboradon inter ŝtatoj, ĉefe en la landlimaj areoj, samkiel verdiktis la Internacia Kortumo.

En tiu ĉi afero denove ni trovas la samajn faktojn jam menciitaj, nome ke la nuraj informoj antaŭ la Kortumo estis tiuj de la du partioj kaj ke la sendependenco de la mediaj spertuloj estas limigita, ĉar ili estas elektitaj de ambaŭ flankoj. La malakordaj opinioj de tiuj du aferoj ege valoras, ĉefe kiam ili abundas je la fakto peti opiniojn al sendependaj spertuloj, same kiel okazas jam en la agado de la "paneloj" de la Monda Organizaĵo pri Komerco, per flua dialogo inter eksteraj kaj internaj spertuloj. La Statuto de la Internacia Kortumo tion permesas, do nur mankas la fakto uzi ĝin.


La lastaj ne tute decidicitaj aferoj ĉe la Internacia Kortumo montros ĉu io nova okazos en la defendo de la medio. Tiel la aferoj pri la "Aeraj aspergoj de herbicidoj" ekigita post plendo de Ekvadoro kontraŭ Kolombio la 31-a de marto 2008, celas juĝi pri la damaĝo al translima medio, kaŭzita por la uzo de herbicidoj, tiel kiel ĝiaj sekvoj por la sano. La afero pri "La balenoj de Antarktio", laŭ plendo de Aŭstralio kontraŭ Japanio, de la 31-a de majo 2010; la afero pri "Kelkaj aktivaĵoj disvolvigitaj de Nikaragvo ĉe la landlimo", plendo de Kostariko kontraŭ Nikaragvo, de la 18-a de novembro 2010, kie kune kun la defendo de la teritoria ŝtat-integreco, aperas mediaj temoj pri

riveraj rimedoj kaj grava damaĝo al naturaj areoj, kelkaj el ili sub internacia protektado. En ĉi tiu afero, la konsidero de kelkaj areoj kiel spacoj inkluzivitaj en la Konvencio de *Ramsar* pri Humidejoj, de la 18-a de januaro 1971, helpos la Kortumon.


Vere, ni konstatas, ke la plimulto de la mediaj konfliktoj ŝuldiĝas al la uzo de akvoj, salaj aŭ ne-salaj, kaj ke la Internacia Kortumo apenaŭ trovas solvojn al tiuj problemoj. Pro tio, mi opinias, kune kun parte de la doktrino, ke vere oni bezonas specialan kortumon por tiuj temoj, ĉefe konstatante, ke ofte la konfliktoj pro manko de akvo kaŭzas internaciajn kverelojn. Vere, akvo estas fonto de vivo kaj samtempe fonto de konfliktoj. La problemo estas la instanco kiu devus krei tiun specialan kortumon, ĉu la Sekureca Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj, ĉar tiu organo celas la gardon de la paco kaj la internacia sekureco, ĉu post pintkunsido pri medio, per traktato, ene de UN, kiel okazis alifoje kaj danke al tio ni havas la traktatojn pri Klimatŝanĝo kaj tiun pri Biodiverseco, aŭ per internacia konferenco, kiel naskiĝis la Internacia Marjura Kortumo post la Tria Konferenco pri Juro de la Maro de decembro 1982 en *Montego Bay* (Jamajko).

la solvo ekaperis. La 21-an de marto 2008, Ĝenerala Direktoro de UNESKO, S-ro Koiĉiro Matsuura, okaze de la Tria Monda Forumo pri Akvo, okazinta en Japanio, diskonigis la kreon de strukturo pro mediacio cun la celo solvi tiujn konfliktojn pro akvo, kiu konsistos el UNESKO, la Tutmonda Konsilio pri Akvo kaj la Konstata Arbitra Kortumo de Hago. Ĝia sidejo estos Parizo kaj la kunlabora struktoro reagos tuj kiam estos krizoj, helpante al ŝtatoj teknike por antaŭvidi kaj preventi tiujn konfliktojn pri akvo. Laŭ UNESKO triono el la 263 internaciaj riveraj basenoj estas kundividitaj de pli ol du landoj kaj el ili, 19 apartenas al kvin aŭ pli ŝtatoj.


Konklude, la internacia praktiko montras, ke la bazaj karakterizaĵoj de la mediaj disputoj bezonas specialan metodologion, kaj samtempe ili malfaciligas la efikecon de la Internacia Kortumo. La jurisprudenco montras la malfacilaĵojn kiujn prezentas juĝa proceduro ĉe la Internacia Kortumo kaj, kompreneble, revivigas la debaton pri la bezono de specialigita kortumo por la protektado de la medio.



Palaco de Justico en Lillo (Francio), inaŭgurita en la jaro 1970



Tiama Palaco de Justico en Lillo, komence de la 20-jarcento



# PROTEKTADO DE LA INFANAJ VIKTIMOJ DE LA HOMO-KOMERCO

✍ **José María Rodríguez Hernández**
**Hispanio**

Laŭ la artikolo 3.c) de la Protokolo por la Prevento, Persekutado kaj Punado de la Homo-Komerco, ĉefe Virinoj kaj Infanoj, kiu kompletigas la NU-Konvencion kontraŭ la Transnacia Deliktado (ankaŭ konata kiel *Protokolo de Palermo)*, oni konsideras infano-komercon, la kaptadon, transporton, translokigon, akceptadon aŭ riceladon de infanoj, tiel konsiderataj, laŭ la artikolo 3.d) de tiu sama Protokolo, al homoj malpliaĝaj ol 18 jaroj, kun la celo ekspluati ilin. Tion mem asertas la artikolo 4.c) de la Eŭropa Konvencio cele la Lukton kontraŭ la Homo-Komerco, kaj la artikolo 5.2 de la Direktivo 2011/35/UE de la Eŭropa Parlamento kaj la Eŭropa Konsilio, de la 5-a de aprilo, rilate la preventon kaj lukton kontraŭ la homo-komerco kaj protektado al la viktimoj.

Kiel okazas rilate la plenaĝulojn, la infano-komerco povas havi malsimilajn celojn:

- ekspluatado seksa aŭ labora.
- Kontraŭleĝa komerco de homaj organoj.
- Perfortaj geedziĝoj.
- Kontraŭleĝaj adoptoj.
- Instigo cele la plenumon de malgrandaj deliktoj.

Krome, kaj laŭ propono de UNICEF, oni povas konsideri ankaŭ viktimojn de la infano-komerco, la infanojn naskiĝintajn de tiuj viktimoj.

**Ĉefaj Juraj Internaciaj instrumentoj por persekuti la infano-komercon.**

La homo-komerco estas tre grava perforto al la homaj rajtoj de la viktimoj, krome temas pri delikto malfacible persekutebla. Feliĉe, tagon post tago, kreskiĝas la internacia kooperado por preventi kaj eviti ĉi tiun delikton, kaj same por protekti la viktimojn. Cele al tio oni aprobis diversajn jurajn dokumentojn internaci-nivele.

**Universalaj dokumentoj.**

Kiel dirite la plej grava dokumento estas la Protokolo de Palermo. La artikolo 6-a de tiu kunveno pritraktas la devojn de la ŝtatoj rilate la protektadon kaj prizorgadon de la viktimoj de ĉi tiu delikto, bedaŭrinde la teksto ne estas sufiĉe postulema, ekzemple, la artikolo 6.4 de la protokolo petas al la ŝtatoj nur konsideri la specialajn bezonojn de la infanoj viktimoj de la homo-komerco, inkluzive la gastigon, la edukon kaj la necesan prizorgadon. Same, oni ne precizigas detale la devojn rilate la preventadon, krome estas tre grava la fakto, ke oni ne mencias la devojn de la ŝtatoj adopti sekurajn procedurojn por certigi la datumon pri la aĝo de la viktimoj, cele koni ĉu efektive temas pri homoj malpliaĝaj ol 18 jaroj aŭ ne.

Estas anakŭ universalaj dokumentoj, kelkaj juraj instrumentoj adoptitaj de Unuiĝintaj Nacioj kiuj celas lukti kontraŭ la perforto al la infanoj. Tiel, la Komencio de UN pri Rajtoj de la Infanoj. Kelkaj artikoloj el tiu dokumento rilatas al

la lukto kontraŭ la infano-komerco. Unu el la plej gravaj estas la artikolo 7.1, kiu proklamas la rajton de la ĵus-naskitoj esti registritaj tuj post la naskiĝo, cele la atingon de civitanecon. Tion same oni proklamas la artikolo 24 de la Internacia Pakto pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj. Temas pri tre grava postulo, tiel konsiderita okaze de informo diskonigita en la jaro 1989 fare de la Komitato UN pri Homaj Rajtoj, laŭ kiu << *la ĉefa celo de ĉi tiu devo registri la infanojn tuj post la naskiĝo estas malpliigi la danĝeron pri kidnapo, vendado aŭ kontraŭleĝa adopto de ĵus-naskitoj.*>> En la sama senco, la rezolucio de la 9-a de aprilo 2013 de la Komitato UN pri Homaj Rajtoj, rilata al la registrado de ĵus-naskitoj kaj agnosko de la jura personeco de ĉiuj homoj, memorigas al la ŝtatoj *la devon registri ĉiujn infanojn tuj post la naskiĝo, sen ia ajn diskriminacio kaj tute sendepende de la leĝa situacio de la gepatroj en tiu ŝtato.*

Fine, ĉe Unuiĝintaj Nacioj, oni aprobis la rezolucion de la Ĝenerala Asembleo 54/263, kiu celas la lukton kontraŭ la vendado de infanoj, la infana prostituado kaj la utiligado de infanoj en pornografio.

**Regionaj dokumentoj, ĉefe Eŭropaj.**

Estas necese paroli pri du gravaj juraj instrumentoj. La unua estas la Eŭropa Konvencio pri lukto kontraŭ la homo-komerco; la alia estas la Direktivo 2011/36/UE. Oni devas memori, ke la Organizo por Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo (OSKE), kiu estas la plej granda regiona internacia organizo por sekureco, jurŝtato kaj demokratio, disponas ekde la jaro 2003 pri speciala respondeculo kaj kunordiganto por lukti kontraŭ la homo-komerco. Same la Eŭropa Unio havas similan funkciulon ekde la jaro 2011, temas pri la kunordigantino kontra la komerco

de prostituitinoj, speciale nomumita de la Eŭropa Komisiono.

Rilate la Direktivon 2011/36/UE, la artikoloj 13-a, 14-a, 15-a kaj 16-a sciigas la devojn de la membro-ŝtatoj de Eŭropa Unio cele la protektadon de la viktimoj de la homo-komerco. Konkrete, la 13-a artikolo enhavas ĝeneralan dispozicion temantan pri la rimedoj adoptendaj por certigi la prizorgadon, apogon kaj protektadon de la ne-plenaĝuloj kiuj estas viktimoj de la homo-komerco. Oni devas esltari ankaŭ la artikolo 16-a de tiu Direktivo, kiu temas pri la situacio de la ne-akompanitaj eksterlandaj infanoj kiuj estas viktimoj de ĉi tiu delikto.

Tamen, estas necese denove memorigi, ke neniu el la antaŭviditaj rimedoj povas esti efika, se la Administracio ne identigas sufiĉe taŭge la viktimojn. Tio estas, la ŝtatoj devas disponi pri sufiĉaj rimedoj por detekti la viktimojn kiuj suferas ĉi tiun delikton kaj ankaŭ koni la ekziston de eblaj ontaj viktimoj. Ĉi tiuj rimedoj estas gravegaj se oni parolas pri landlimaj kontroloj kaj lukton kontraŭ la ne-leĝa migrado.

## Infanoj viktimoj de homo-komerco kaj ne-leĝa migrado

Multe oni verkis pri la devoj de la ŝtatoj rilate la protektadon de rifuĝintoj kaj aliaj homoj bezonantaj internacia protektado, kiam tiuj homoj uzas "ne-regulajn" vojojn por migri. Kompreneble, oni ne povas neigi la rajton de la ŝtatoj rilate la kontrolon de iliaj propraj landlimoj, tamen tiu rajto devas esti realigita akorde al la protektado de la homaj rajtoj de la migrantoj. Tion memorigas ekde antaŭ kelkaj jaroj la Ĝenerala Asemblo de UN mem, tiel ĝi subkstrekas la suverenecan rajton de la ŝtatoj promulgi kaj apliki rimedojn rilatajn al la migrado kaj sekureco en la landlimojn, tamen la Ĝenerala Asemblo de UN memorigas ankaŭ ke, kiam la ŝtatoj realigas tiun suverenecan

rajton, oni devas plenumi ankaŭ la internaciajn akordojn, inkluzive kompreneble tiujn rilatajn al la homaj rajtoj, cele la plenan respekton de la homoj sub la ŝtata jurisdikcio, ankaŭ de la migrantoj. Verdire, la infanoj kiuj estas viktimoj de infano-komerco dum la migrado estas ege vundeblaj dum tiu, ofte, longa migrada vojo, pro tio estas necese plifortigi la rimedojn por identigi kaj protekti tiujn viktimojn, ekzemple kun la sufiĉe taŭga trejnado de la funkciuloj ĉe la landlimoj por detekti kiam la migranta infano estas viktimo de homo-komerco.

Kompreneble, ne nur en Eŭropo oni luktas kontraŭ la infano-komerco. Tiel, la juĝo de la Amerika Kortumo pri Homaj Rajtoj de la 16-a de novembro 2009, en la afero konata kiel "Kotona Kamparo" estis tre grava. Laŭ tiu juĝo ŝtato ne povas esti konsiderata respondeculo de la perforto kontraŭ la homaj rajtoj fare de homo, aŭ grupo de homoj, kontraŭ alia homo, aŭ alia grupo, se la ŝtato ne konas ĉi tiun eblan riskon. Tio signifas, ke rilate al la lukto kontraŭ la infano-komerco la unua, kaj eble plej grava, agado de la ŝtatoj estas koni, eĉ antaŭkoni, la riskojn de la infanoj kaj grupoj de infanoj, suferi tiun delikton.

Alia historia juĝo estis tiu de la afero Rantsev kontraŭ Kipro kaj Rusio, fare de la Eŭropa Tribunalo pri Homaj Rajtoj, en la jaro 2010. En ĉi tiu kazo, rusa civitano plendis kontrau Rusio kaj Kipro. La filino de la rusa civitano, venis en Kipron por labori kiel "artistino" en kabaredo de Limassol (Kipro), laŭ la argumento de la Tribunalo ŝi ne estis kontraktita por labori kiel artistino sed kiel prostituitino, aferon pri kiu la rusaj doganaj aŭtoritatuloj ne priatentis kiam ŝi povis vojaĝi eksterlanden kun labor-kontrakto. Post kelkaj tagoj en tiu laboro la knabino fuĝis, tamen la posedanto de la kabaredo re-kaptis ŝin kaj irigis ŝin en la policejo por denonci ke ŝi migris en Kipron ne-leĝe. La policanoj

denove havigis la knabinon al la posedanto de la kabaredo, ĉar ili havis ŝian paŝporton kaj aliajn dokumentojn. Post kelkaj horoj oni trovis la kadavron de la knabino pendumita el balkono. Laŭ la kipraj aŭtoritatuloj la knabino mortis pro defalo.

La patro de la knabino ne ĉesis protesti kaj esplori la kaŭzojn de la morto, kaj de la loĝado en Kipro de la junulino. Tiam li denoncis al Rusio kaj Kipro ĉar ambaŭ ŝtatoj estis komplicoj de la homo-komerco suferita de sia filino; rilate Rusion, ĉar la laboraj aŭtoritatuloj de tiu lando konis la situacion de kelkaj junulinoj kontraktitaj en Kipro por labori ĉe "artistaj" kabaredoj, kvankam estis afero ĉies konata ke temis pri bordeloj. Kaj al Kipro ĉar ili ne protektis la junulinon kiam ŝi iris en la policejon, ĉar la funkciuloj ne kapablis vidi, ke temis pri viktimo de homo-komerco.

# Mallongaj Juraj Informoj

## § INTERNACIA TAGO CELE LA FORIGON DE LA PERFORTO KONTRAŬ LA VIRINOJ.

La Eŭropa Komisiono, okaze de la Internacia Tago cele la forigon de la perforto kontraŭ la virinoj, okazinta la pasinta 25-a de novembro, diskonigis novan strategian dokumenton kiu celas doni novan impulson al la lukto kontraŭ la virina seks-organa mutilado en la Eŭropa Unio kaj ankaŭ fore de ĉi tiu regiono. Oni scias, ke ĉi tiun fian agadon, internacie konsiderata kiel perforto de la homaj rajtoj de virinoj kaj infaninoj, oni realigas ĉiujare al 500.000 virinoj kaj infaninoj nur en Eŭropo, kaj al 125 milionoj en la tuta mondo.

Por kombati la virinan seks-organan mutiladon, la Eŭropa Komisiono uzos specialan buĝeton kun la celo preventi ĉi tiun agadon, pli bone helpi la viktimojn kaj informi al la kurac-profesiuloj. Same, oni apogos al la juraj naciaj instancoj protekti la virinojn kiuj riskas suferi ĉi tiun mutiladon pere de la koncedo de la azil-rajto al eblaj ontaj viktimoj. Krome, la Eŭropa Servo pri Ekstera Agado ekigos kampanjon en diversaj landoj por forigi ĉi tiun praktikon kiu intime rilatas al la infana mistraktado.

## § PREMIO POR AGNOSKI LA LUKTON FAVORE AL LA HOMAJ RAJTOJ – 2013.

La Kunsido de la Eŭropa Advokataro (CCBE) donis sian jaran premion pri Homaj Rajtoj 2013, al la Advokatara Kolegio de Istambulo (Turkio) kaj konkrete al la Dekano, S-ro *Umit*

*Kocasakal*, kiel agnoskon al la eksterordinara kompromiso, persistado kaj kuraĝo en la defendo de la homaj rajtoj en Turkio. La Advokatara Kolegio de Istambulo apogis konstante siajn membrojn fronte al la atakoj de la turkaj aŭtoritatuloj kontraŭ la advokata profesio kaj la sendependeco de la advokatoj. La Dekano *Kocasakal* mem ricevis minacojn fare de la politika kaj jura povoj en Turkio, pro sia apogo al la advokatoj en la proceso *Balyoz*. Tiuokaze oni petis konstante al la Tribunalo daŭrigi la proceson akorde al la leĝo kaj al la principio pri egaleco, post la denuncoj prezentitaj de la advokatoj pro timigo, kontraŭleĝa viglado kaj misagadoj de la defendo-rajto de la akuzitoj. Pere de ĉi tiu nova agnosko la Kunsido de la Eŭropa Advokataro deziras klare esprimi sian kontraŭan pozicion rilate la malebligon de komunikado inter advokato kaj kliento.

## § VENDADO DE EŬROPAJ PAŜPORTOJ.

La Eŭropa Parlamento, renkontiĝita en Strasburgo komence de la jaro 2014, debatis kun la Eŭropa Konsilio kaj la Eŭropa Komisiono pri la nova civitan-leĝo de Malto, kiu ebligas la vendadon de maltaj paŝportoj sen la devo loĝi en ĉi tiu mediteranea ŝtato. La atingo de malta paŝporto rajtigas la posedanton eniri kaj resti en kiu ajn ŝtato de la *Schengen*-zono. Kelkaj eŭrodiputitoj deklaris, ke la atingo de la eŭropa civitaneco kontraŭ pago devas esti limigita laŭ tre striktaj kondiĉoj, ekzemple kun la devo loĝi en la lando aŭ investi en ĝi. Ekzemple en Hispanio, la eksterlandanoj kiuj investas grandan kvanton da mono, minimume 500.000 eŭrojn, aŭ favorigas la realigadon de grandaj entreprenaj projektoj rajtas ricevi la hispanan paŝporton. Samaj leĝoj ekzistas en Portugalio, Grekio, Ĉipro kaj Hungario.

## § INDIĜENOJ EN KENJO ATENDAS HISTORIAN JUĜON.

Unuafoje en la Historio de Afrikko, indiĝena popolo prezentis juran plendon ĉe la Afrika Kortumo de Homaj Rajtoj. La *ogiekoj* estas unu el la lastaj popoloj kiuj dediĉas sin al la rikoltado kaj la ĉasado sur Afriko. Ili estis forpelitaj de la Kenja registaro el sia deĉiama territorio, la Maŭa praarbaro. En la jaro 2012, la Komitato pri Homaj Rajtoj kaj Popoloj de Afriko konsideris, ke temis pri grava perforto de la homaj rajtoj. Post tio, grupo favora al la rajtoj de la minoritatoj prezentis plendon ĉe la Afrika Kortumo. Tiam, dudek ses *ogiek*-maljunuloj iris en Adis-Abebon (Etiopio) por atesti kontraŭ la kenja registaro. Ja oni povas diri, ke temas pri historia momento por tiu popolo. La Kortumo serĉas atestilojn rilatajn al la efektoj de tiuj perfortaj forpeloj en la vivo de la *ogiek*-popolo, ĉefe rilate ilian sanon, vivmanieron kaj religion.

Laŭ la plendanto, la indiĝenaj popoloj estas la plej taŭgaj medi-konservantoj, kurioze oni kutime forpelas ilin el iliaj tradiciaj teritorioj por favorigi la naturan konservadon. La Afrika Kortumo petis en la jaro 2013 halgiti tiujn devigajn forpelojn, tamen post tiu decido multaj *ogiek*-loĝejoj estis detruataj. Laŭ Daniel KOBEI, direktoro de la Programo por la Disvolvo de la Ogien-Popolo, ĉi tiu proceso estas granda antaŭeniriga paŝo por la realigo de justico por tiu popolo.

# § BRAZILO, LA UNUA LANDO EN AMERIKO MALPERMESANTA *UBER*-KOMPANION.

Tribunalo en San-Paŭlo malpermesis la servojn oferitajn de la kompanio *Uber* en la tuta Brazilo, kiu favorigas kontaktojn inter pasaĝeroj kaj privataj ŝoforoj sen taksia permeso. Tiu usona entrepreno disponas pri tri tagoj, post la oficiala ricevo de la juĝo, ĉesi siajn servojn en ĉi tiu giganta sudamerika ŝtato. Male, se tion ne plenumas, ĝi suferos tagan monpunon (100.000 realoj).

La juĝisto de la Civila Ĉambro de la Justica Tribunalo de San-Paŭlo ankaŭ malpermesis al *Google*, *Apple* kaj *Microsoft*, oferi al iliaj uzantoj aliron al ĉi tiu servo. *Uber*, fondita en Usono en la jaro 2009, oferas transportajn servojn en 56 landoj. En la jaro 2014 venis en Brazilon, kie ĝi jam funkciis normale en San-Paŭlo, Brazilio kaj Belo-Horizonto. La Sindikato de Ŝoforoj kaj Taksi-Laboristoj de San-Paŭlo prezentis plendon ĉe la tribunalo, kun la ĉefa argumento, ke tiuj veturiloj, do ankaŭ la servoj oferitaj, ne estas kontrolataj de la administracio. La *Uber*-kompanio informis pri sia deziro oferi al brazilanoj sekuran kaj fideblan transportan servon, malsimila al la taksioj en tiuj urboj. La juĝo povas esti apelaciata.

*Uber*-kompanio suferis samajn plendojn en Hispanio kaj Germanio, ankaŭ en pliaj ŝtatoj, post la protekstо de la taksiistoj kiuj denuncis, ke *Uber* estas mallojala kompetanto, ĉar ĝi oferas servojn similajn al taksioj, sed sen administracia permeso, do, ankaŭ ne kontrolo.

# § LAŬ NOV-ZELANDA JUĜO NE ESTAS NECESE INFORMI PRI AIDOSO SE ONI UZAS KONDOMON.

Nov-zelanda juĝisto deklaris, ke viro suferanta aidoso-n ne povas esti akuzita, laŭ la nov-zelandaj leĝoj, pro la ne-informado pri lia malsano okaze de koito, se li uzis kondomon. Unuamomente 36-jaraĝa nov-zelandano estis akuzita praktiki danĝeran seksan agadon kun virino, ĉar li ne sciigis al ŝi, ke li suferis aidoson. Antaŭ kelkaj jaroj alia homo ricevis punon (300 horoj da socia laboro) pro la sama akuzo. Tamen, laŭ la juĝisto ambaŭ kazoj estas tute malsimilaj, ĉar en ĉi tiu lasta afero, la akuzito praktikis koiton ne sciigante pri sia sana stato, tamen li uzis nenian rimedon por malebligi infekton. Sed, ĉi-okaze, laŭ la juĝisto, la akuzito sekvis moralan devon preni antaŭzorgojn por eviti kian ajn infekton, ĉar li uzis kondomon okaze de la koito. Verdire, la akuzito uzis kondomon okaze nur de vagina koito, sed ne dum aliaj praktikoj kun sia kunulino. Tamen, laŭ la spertuloj, la risko favorigi infekton okaze de tiuj seksaj agadoj, malsimilaj al vagina koito, estis minimuma. La respondeculino pri Aidoso-Fondaĵo de Nov-Zelando deklaris, ke homoj atendas ricevi verajn informojn de amanto infektita de aidoso.

Utilaj Notoj dum la Kuveno de EJA

Lillo 2015

§

Eldonita en la urbo CÓRDOBA (Andaluzio – Hispanio) julio 2015.

Prezentita en LILLO (Francio), okaze de la 100-a Universala Kongreso de Esperanto, 25-a julio / 1-a aŭgusto 2015.

**Esperanta Jura Asocio**

**Andaluzia Esperanto-Unuiĝo**